# Esperanto-Numismatika Asocio






**Esperanta Numismatiko** 2025 **Jarkolekto 12 - Numero 1**




# *E N H A V O T A B E L O*

## de januaro 2025

Titolpaĝo: ………………………………………………...…...……....  1

Enhavotabelo ……………………………………………………………..  2

De ni por … ni! ………………………………………………….........  3

Moneroj & medaloj …………………..………………..…………….... 5

*XXXVI  Hispana Kongreso de Esperanto 1976*

*Plaketo dediĉita al la 74a UK de Esperanto*

*Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij (1857-1935)*

*D-ro L.L. Zamenhof (1859-1917)*

Spikumaĵoj & Suplementoj: Sens: ĉu vere tiel enigma franca urbo? …  11

Por spuremuloj! Laboristaj Esperanto-Organizoj (LEA) ……………..  12

Valormarkoj & Valorbiletoj: ……………………………………… 13

Aspektoj de Numismatiko: Numismatikaj mozaikoj (1)………………...  15

Medalistoj: 37 Charles Edward Barber(1840-1917) …………………...  16

Historiaj Aspektoj: Ĉu esperantista identeco estas nur mito? ..…………..  17

Terminaro: Alfabeta listo (40) …………………………………........  20

Numismatika Forumo: For la manaĉoj de niaj kontantaĵoj!…………..…  21

El la gazetaro: ………………………………………..………………. 22

Retpoŝto ……………………………………………………………  23

Anoncoj & Eventoj ……………………………………..…………  34

***Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)***

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: http://ena.frali.bplaced.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

# *D E  N I  P O R  . . .  N I!*

***"Se iam, iel la tuta historiografio perdiĝus,***
***moneroj kaj medaloj senĉese ĝin heroldus"***

***Johann Wolfgang von Goethe (1749–1832)***

Jam kelktempe esperantaj filatelistoj kaj numismatoj libervole kunlaboras, dume ja kvazaŭ ĝemeliĝis. La filatelistoj eĉ rezervis lokon por ENA en la propra, sufiĉe nova retejo!



En pluraj Universalaj Kongresoj Elda Doerfler, prezidant(in)o de ELF-Arek (revuo: "La Verda Lupeo") kaj via servanto ŝultro ĉe ŝultro informis, propagandis kaj varbadis.


Tamen anoncas sin novaj, iom malpli agrablaj implikaĵoj por ambaŭ asocioj. Etaj societoj, kluboj kaj eĉ pli grandaj organizoj, kiel UEA kaj La Civito, lastatempe apenaŭ emas honori esperantajn eventojn per eldono de filatelaĵoj aŭ numismatikaĵoj ***(tamen jen la plej akurataj kaj efikaj elpendaĵoj kaj atestaĵoj de nia historio!)***. Pro la evoluado de la diĝitigata tutmonda komunumo, novaj filatelaĵoj - ekz. por afranki leterojn - ŝajne iĝis "eksmodaj antikvaĵoj" kaj medaloj evidente (!) estas tro kostaj! (*Kvazaŭ ne eblas organizi vendojn per antaŭmendoj, do per preskaŭ senriskaj projektoj!)* Nu, tempoj ŝanĝiĝas, sed bedaŭrinde ankaŭ la fakgrupaj tirĉevaloj, kiuj bedaŭrinde ne retrojuniĝas. Dank'al "novaj" volontuloj nia ELF-Arek, eble kun iom malpli stabila estonteco, i.a. pro aktualaj privataj problemoj de ĝia standardistino, bonŝance ne devos ŝlosi la pordojn! La taskoj por organizi kaj stimuli la asocion estos baldaŭ en la manoj de diversnaciaj kunlaborontoj. La prezidantino evidente restos… la prezidantino! Jen fenikso, kiu bonŝance leviĝos el la propra nesto.**Vivu do nia kara ELF-Arek!**

Rilate al ENA la situacio provizore ne jam estas ege urĝa, sed ankaŭ en nia asocio la tirĉevalo ne plu estas junulo.Tamen, per ĉi nova numero ENA plenkuraĝe lanĉas la 12an jarkolekton de la revuo. La ENA-projekto certe estas kaj restos pli "junverda" ol tiu de la filatelistoj, sed ankaŭ por nia fakgrupo la estonteco ne vere estas tre certa … ĝis iam aperos novulo(j)!


Niaj plej gravaj kaj senĉesaj taskoj estos kaj restos krei la unuajn esperantajn numismatikajn "Katalogo"-n kaj "Nomenklaturo"-n en la historio de la internacia lingvo. Do plej grave estas daŭre nutradi la rubrikojn "Moneroj & medaloj" kaj "Terminaro". Por ambaŭ certe tute ne mankos temoj kaj terminoj. Ni ja ne dubas, ke ankoraŭ multaj medaloj ie en Esperantujo restas provizore sub la radaro kaj atendas malkovron, ĉefe per helpo de niaj legantoj, kiujn **ni petas informi nin pri novaj aŭ malnovaj eldonaĵoj en la propra lando aŭ regiono…**

Por la estonta aliĝo de membroj el "novaj" landoj, ni ne plu montros la nombrojn de membroj individuaj kaj asociaj per la tradiciaj, pli limigitaj tabeloj. Dank'al la libervola helpo de juna komputila fakulo ni trovis pli taŭgan ilon por havigi kaj montri al vi kalejdoskopon pri la "membro-rikoltoj" de la pasintaj dek-unuaj jaroj. Jen la novaj superrigardoj:

## *Sinoptiko pri la mondvasta lokalizo de ENA-membroj*




En la epoko 2014-2024 aliĝis 170 individuoj kaj 25 asocioj tutmondaj.




***La redakcio tutkore dankas S-ron Maarten Boon, AI-a fakulo kaj volontulo de ENA!***

## Tipo A 1 - Esperanto-moneroj & -medaloj

XXXVI Hispana Kongreso de Esperanto 1976






| | |
|---|---|
| Lando: Hispanio | Kvanto: *serĉata* |
| Metalo: latuno(?) | Pezo: *serĉata* |
| Diametro: 30 mm | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 1976 | Diko: *serĉata* |

***Averso:***

ĉirkaŭe: " XXXVI HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EL FERROL DEL CAUDILLO 21-24 JULIO 1976"

meze: t.n. "Puerta del Dique" en Ferrol. Ambaŭflanke de la pordego: maldekstre, la urba blazono, dekstre, kvinpinta esperanto-steleto.






***Rimarko:*** "caudillo" estas la hispana vorto por "*gvidanto*" (itale "duce", germane "Führer"), eks-"honora" titolo por la faŝista diktatoro Francisko Franco. *"El Ferrol del caudillo"* estis la kastilia nomo de la urbo ĝis 1975, fino de la diktaturo kaj komenco de la renesanco de la hispana demokratio.

## Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

Plaketo dediĉita al la 74-a Universala Kongreso de Esperanto






Lando: Bulgario

Metalo: latuno

Mezuroj: 165 mm x 165 mm

Jaro: ĉirkaŭ 1988-1989

Kvanto: kvin (= tri kun, du sen surskribo)

Pezo: 1879 g

Medalisto: Bogomil Ĵivkov

Diko: 15 mm

### Averso:

*unua varianto:*

meze, fenestro kun kurtenoj ambaŭflanke. Sub ĝi tablo kun surmetitaj libroj, krajonujo kun skribiloj, pomo kaj vazo kun floroj. Sur la fenestro, surskribita per reliefaj literoj:

74-a
UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
BRAJTONO
BRITIO
1989

*dua varianto*:



la dua varianto (sen surskribo) estis kreita kiel premio por la Nacia Literatura Konkurso “Ivan Krestanov”, Sofio 2011. En ĝi do mankas la teksto en la fenestro, malkiel en la unua varianto.

## Rimarko 1:

la unua varianto de la plaketo estis kreita ĉirkaŭ 1988-1989, okaze de la 74-a Universala Kongreso de Esperanto en Brajtono, Britio.

## Rimarko 2:

jen foto pri la gajnintino de la arĝenta premio en la Nacia Literatura Konkurso, Marina Kumanova, kun plaketo kaj diplomo enmane. Sur la tablo aliaj artefaktoj de la medalisto!




Dekstre, starante, la artisto-medalisto Bogomil Ĵivkov. Sidante, lia edzino, artistino-pentristino Maja Gorova, kiu afable kaj lerte preparis kaj esperantigis la priskribojn de la Ĵivkov-medaloj en la jarkolektoj XI kaj XII!

***Multan dankon denove al ambaŭ, niaj karaj Maja kaj Bogomil, al kiuj ni deziras novajn sukcesojn!***



**Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij** (1857-1935) estis rusa kaj sekve sovetia raketsciencisto kaj pioniro de la kosmonaŭta teorio. Kune kun Hermann Oberth kaj Robert H. Goddard, li estas ĝenerale konsiderata kiel unu el la fondintoj de la raketa kaj kosmonaŭta sciencoj. Liaj verkoj inspiris raketinĝenierojn kiel Sergej Koroljov kaj Valentin Gluŝko kaj kontribuis al la sukcesoj de la sovetia kosmoprogramo.

Li publikigis pli ol 88 verkojn pri spacovojaĝoj kaj samspecaj temoj. Inter liaj verkoj estas dezajnoj por raketoj kun fuziloj, plurŝtupaj akceliloj, kosmostacioj, aerkluzoj por elirado el kosmoŝipo en la spacon, kaj fermciklaj biologiaj sistemoj por disponigi manĝaĵojn kaj oksigenon en kosmajn koloniojn.

Lia plej grava verko, publikigita en 1903, estas *"La esplorado de la kosma spaco per rimedoj de reakciaj aparatoj"*.Ciolkovskij kalkulis, ke la horizontala rapideco - necesa por minimuma orbito ĉirkaŭ la tero - estas 8.000 m/s kaj, ke ĝi povus esti atingata per plurŝtupa raketo, propulsata per likvaj oksigeno kaj hidrogeno. En 1903 li publikigis la artikolon *"Enketo pri eksterkosmaj raketaj aparatoj"*, en kiu li unuafoje pruvis, ke raketo povas plenumi kosmoflugon. En tiu artikolo, kaj en ĝiaj daŭrigoj, li evoluigis kelkajn ideojn pri misiloj kaj pri la uzo de likva raketmotoro.

Neniuj eksterlandaj sciencistoj komence aprezis lian esploradon, kiu nuntempe estas konsiderata kiel gravega scienca progresado. En 1911 li publikigis la duan parton de la verko *"La studo de kosmaj raketaj aparatoj"*. Ciolkovskij strebis venki la graviton, determinis la rapidecon kiun oni bezonas por elirigi la aparaton en la sunsistemon kaj krome la flugtempon. Tiam, finfine, tiu specifa artikolo kaŭzis aplaŭdegon en la tuta scienca mondo.

Ciolkovskij influis postajn raketsciencistojn ĉie en Eŭropo, i.a. la poste fifaman Wernher von Braun. Rusaj serĉteamoj post la dua mondmilito ĉe Peenemünde trovis germanan tradukon de libro de Ciolkovskij, de kiu preskaŭ ĉiu paĝo estis kovrita per komentoj kaj notoj de la germana militkrimulo.

Rusa raketmotora dezajnisto, Valentino Gluŝko, kaj raketdezajnisto Sergej Koroljov kiel junuloj ankaŭ studis la verkojn de Ciolkovskij, kaj ambaŭ provis transformi la teoriojn de Ciolkovskij en la praktikon. Koroljov eĉ konsideris vojaĝon al Marso kiel la pli grava prioritato, sed en 1964 li decidis konkuri kun la usona projekto Apolono por konkeri la lunon…

*Fonto: vikipedio*

## Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al esperanto

Konstantino Eduardoviĉ Ciolkovskij (1857-1935)







| | |
|---|---|
| Lando: Rusio / Sovetunio | Kvanto: 4. 000 000 |
| Metalo: kupro-nikelo | Pezo: 12,3 g |
| Diametro: 31mm | Medalisto: Sergej Miĥajloviĉ Ivanov |
| Jaro: 1987 | Diko: 2,3 mm |

### *Averso:*

dekstre-meze: Ciolkovskij sidante kaj rigardante maldekstren

maldekstre-antaŭe: lia nomo cirilskribe: К.Э. ЦИОЛКОВСКИЙ
liaj vivojaroj: 1857-1935
fone: steletoj kaj raketo

### *Reverso:*

blazono de la Soveta Ŝtato kun nacia siglo CCCP, cirile "1 rublo" kaj la jarindiko 1987

### *Rando:*

skribo: ОДИН РУБЛЬ = unu rublo

### *Rimarko 1:*

Tiu mondfama scienca pioniro kaj "patro de kosmonaŭtiko" estis ankaŭ **esperantisto kaj membro de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU)**

### *Rimarko 2:*

en 1987 la sovetunia registaro eldonis ĉi memorigan moneron kun lia bildo, okaze de la 130a datreveno de lia naskiĝo

### *Rimarko 3:*

la tipo "rublo-moneroj" cirkulis de 1961 ĝis 1991

### *Rimarko 4:*

la monero estis gisita en "medalfrapo"- stilo (↑↑)

## Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

D-ro L.L. Zamenhof (1859-1917)



(1)






(2)

Lando: Jugoslavio / Slovenio (?)

Metaloj: bronza (1) / arĝentita (2)

Diametro: 19 mm

Jaro: *serĉata*

Kvantoj: *serĉataj*

Pezoj: 3,58 g (1) / 3,75 g (2)

Medalisto: *serĉata*

Diko: 1 mm

### *Averso:*

supre, ĉirkaŭe: (1) "**1857** • D-ro LL ZAMENHOF • 1917"***(vidu rimarkon du!)***
(2) "1859 • D-ro LL ZAMENHOF • 1917"

meze: busto de Zamenhof, parte maldekstren

### *Reverso:*

meze, enkadre: (1) "JERAŠA" (2) "JERAŠA LJUBLJANA".

surface, reverse: (1) grajneca tavolo (2) glata tavolo

### *Rimarko 1:*

ambaŭ variantoj estas miniaturaj medaloj kun poste aldonita pinglo, do laŭ funkcio: *insignoj*

### *Rimarko 2:*

sur varianto (1) montriĝas historiografia **eraro**, pro mencio de **1857** kiel naskiĝjaro de Zamenhof; la arĝentita ekzemplero tamen indikas la korektan jaron 1859!

### *Rimarko 3:*

pro manko de jarindikoj *koncerne la eldonjaron* sur la medaletoj mem, ili malhelpas indiki ĉu la artefaktoj estas jugoslavi- (ĝis 1990) aŭ sloveni-devenaj.

# Sens: ĉu vere tiel enigma franca urbo?









Olda, antaŭ nelonge retrovita foto (supre) montras, ke vere aktivis esperantista klubego en la franca urbo Sens. Aliflanke, <u>la koncerna medalo estis sendube emisiita en 1912</u>… Do, ĉu "*Sens juin 1908*" supozendus, ke temas pri intenca posta antaŭdatumo sur ĉi tiu specimeno? Se jes, **farita de kiu, kiam kaj kiuokaze**? La enigmo provizore (?) restas plu malsolvita!

# *P O R   S P U R E M U L O J !*

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.*

**XXa enigmo**

**Laboristaj Esperanto-Organizoj (LEA)**

*Bronza, blanke kaj verde emajlita membro-insigno el la tridekaj jaroj de la antaŭa jarcento. Diametro:18 mm*




***Kiu el niaj legantoj jam vidis ĉi tiun "insignon" kaj povas havigi al ni detalajn informojn (diametro, pezo…)?***

# V A L O R M A R K O J   &   V A L O R B I L E T O J





Anonima Societo kun varieblaj Kapitalo kaj Akciularo

SOCIA SIDEJO EN PARIS

Komenca kapitalo de 1.000 Frankoj altigebla ĝis 50 000 frankoj Laŭ decido de la dua ĝenerala fondiga kunveno de la 9a de Aŭgusto 1919, kaj poste ĝis 250.000 frankoj laŭ decido de la ĝenerala eksterordinara kunveno de la 19a de Majo 1926 ;

Kapitalo dividita en akcioj de 25 Frankoj.

Manskribe: - *"Paris, le 30 Mai 1932"*
- *"Hotelo Cambrai, Norde de Parizo"*




Numerataj akciaj kuponoj

# *A S P E K T O J   D E   N U M I S M A T I K O*

## Numismatikaj mozaikoj (1)



***Finnlando: ne-esperanta sesmedala bronza mozaiko (averso + reverso) honore al la Nobel-premiitoj de 1974. Medalisto: Kauko Räsänen; mezuroj: 40 x 40 mm; eldonkvanto: 900***

*Daŭrigota*

# *M E D A L I S T OJ*

## 37 Charles Edward Barber(1840-1917)



Barber naskiĝis en 1840 en Londono. En 1852 la familio transloĝiĝis al Usono. En 1865 ili denove transloĝiĝis, ĉi-foje al Filadelfio, ĉar lia patro estis dungita kiel adjunkta gravuristo de la ŝtata monfarejo. Charles mem, kiu lernis la gravuristan fakon de sia patro, en 1869 estis dungita kiel adjunkto ĉe la sama monfarejo kaj en 1880 li iĝis la sesa usona ĉefgravuristo, nomumita de prezidento Rutherford B. Hayes.

Li famiĝis precipe pro liaj Liberty Head-moneroj, kromnomitaj *Barber-dekcendaj dolaroj, Barber-kvarondolaroj kaj Barber-duondolaroj.* Li mortis en la sama jaro kiel L.L. Zamenhof.

Barber ne nur dezajnis usonajn monerojn, sed ankaŭ eksterlandajn, dank'al liaj fakuleco, famo kaj la publika respekto en kaj ekster Usono.



Barbera Kubo-skizo el 1915

Li kreis por Kubo la famajn "centavo-peso"-monerojn en la dudekaj jaroj (ekde 1915) de la pasinta jarcento (do antaŭ la popola revolucio kontraŭ la diktatoro Batista!).Surbaze de la tiama reverso, en 1990 en Kubo (tamen ne vere bona amiko de Usono!) estis eldonitaj okaze de la UK en Havano nikela monero de unu peso kaj arĝenta monero de kvin pesoj, kies aversoj do estis adoptitaj de la oldaj skizoj de la tiama kuranta poŝmonero de Barber el 1915.



Barber-skizo reuzita en 1990

# Ĉu esperantista identeco estis nur mito?


*Ĉiam kaj ĉie en la historio popoloj emfazis siajn "intuicion", eĉ "certecon", laŭ kiuj ili havus propran identecon, tute malsaman de tiu de aliaj popoloj kaj kulturoj. Tio (kiel klare montras kaj pruvas la juddevena sciencisto-verkistoYuval Noah Harari en siaj legindaj libregoj "Sapiens" kaj "Nexus") ne baziĝis sur historiaj aŭ alispecaj sciencaj faktoj, sed ekzistis nur surbaze de tre oldaj mitologiaj rakontoj kaj t.n. "sanktaj" libroj. Jen la plej grandioza speco de sintrompado kaj la plej fia speco de popoltrompetado. Ili ja fanatike pretendas esti favorataj, eĉ elektitaj popoloj. Tiun fenomenon sciencistoj nomas finaciismo aŭ ŝovinismo.*

*La iniciatinto de esperanto kaj de la esperantismo, mem juddevena, kontraŭstaris tiun mondkoncepton, kiel li klare diris en 1905 en oficiala parolado okaze de la unua Kongreso Esperantista en Francio:* ***"… hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj".*** *Certa esperantista fakgrupo tion ankoraŭ eĉ pli laŭte heroldas per sia nomo, "SAT" (**Sennacieca** Asocio **Tutmonda**)…!*

*La fonto de esperanto estis genia ideo, ne dogmisma ideologio. Ne memstara celo, sed vojo/ilo al homa interkomprenado surbaze de egaleco inter homoj kun malsamaj lingvoj kaj kulturoj. Zamenhof estis optimisma realisto, kiu celis nek "finvenkon"(kiel ceteraj adeptoj) nek "raŭmismon", sed aspiris pere de facila interkomprenilo (iom) pli bonan mondon.*

*Kiel erudito li sendube ankaŭ konis la filozofian rakonton pri la fifama decido de Pandoro, kiu, pro scivolemego, disvastigis en la mondon ĉiujn malbonaĵojn de la "sapiens"-speco. Restis nur unu savilo en la skatolo: la espero. Tial la zamenhofa pseŭdonimo, poste la nomo de la lingvo, iĝis* ***"Doktoro Esperanto".*** *Jen la lasta idealo, la lasta vojo kaj la lasta ŝanco.*

Esperanto ne vere "religiece" ŝvebis en la tiutempa aero, ĝi estis konkreta socia elemento de la kulturo de la 19a jarcento en Eŭropo. Tiu "Belepoko", plena je novaj teknikoj kaj sociaj novaĵoj, invitis al optimismo kaj naskis utopiojn en ĉiuj segmentoj de la tiama socio. Ne mirinde do, ke ankaŭ la ideo pri internacia lingvo (tamen tute ne nova ideo, se oni konsideras la pasintajn jarcentojn kaj eĉ Volapük) stimulis kaj allogis multajn homojn de tiu romantika epoko. Tiel ekis kaj kresketis ankaŭ propra esperantista identeco, kiun oni deziris montri al la ĉirkaŭa mondo. Komercistoj evidente tuj flaris oportunaĵojn! Ekzemple fabrikantoj de insignoj, kiel Holy Fréres el Svislando. Unu el tiaj vere neordinaraj, juvelecaj insignoj eĉ ornamis la roverson de Ludoviko mem dum la Universala Kongreso en Dresdeno (1908)!






Jen sekve ekzemplo de propagandilo far komercisto, kiu stimulis la esperantistan klientaron montri memfide la novan identecon.Temas pri poŝtkarto sendita en 1907 de iu Alfred Boitard el la franca komunumo Pierre (regiono de la riveroj Saône et Loire) al iu Ch. Brunet en Bordeaux (Gironde). La averso montras, ornamita per fragmento el zamenhofa poemo kun subskribo, bildojn en tri diversaj formatoj, de eksterordinaraj ***"JUVELSIGNETOJ, reala amplekso kun verdemajlita stelo (pingloj, broŝoj aŭ pendaĵetoj)".*** Fabrikinto estis Robert Enault, eldonisto, 41, rue Turbigo, PARIS. Sur ĝi estis gravuritaj maro, montoj, lumturo kaj grandlitere "ESPERANTO", kies literoj ŝajnas kvazaŭ radioj de leviĝanta suno aŭ ĉielarko. Supre brilas verdemajlita stelo. La medalo aĉeteblis bronz-arĝente, tutarĝente, arĝente kun orumita rando kaj 18-karate ore; kompreneble la kostoj estis malsamaj laŭ la uzita metalo.

**Laŭ iamaj informoj de nia karmemora samideano Jean Amouroux ĉi artaĵo eĉ gajnis arĝentan medalon dum franc-brita ekspozicio en Londono (1908)!!!**

Antaŭ ne tre longe mi mem hazarde trovis de ĝi sufiĉe grandformatan ekzempleron arĝentitan, kiu poste estis priskribita en nia ***jk.8, n-ro1, p.5***. Tiu manogranda, (eble unika!) tipo certe ne povas esti konsiderata kiel delikata "*arta esperantista signeto*", sed prefere kiel murmedalo aŭ plaketo, taŭga kiel elpendaĵo por ekspozicioj aŭ monumentoj!

Dum la komencaj jaroj de la pasinta jarcento, krom la eldonado de varbokartoj−plejparte admirindaj pro la artismaj aspektoj, kaj de glumarkoj, kiuj abunde ornamis korespondaĵojn−oni produktis **medalojn, juvelojn, horloĝojn** k.s.,por kontentigi la dezirojn de ĝisostaj esperantistoj, kiuj emis ĉie videbligi unuavice la esperantan simbolon, nome la verdan stelon.Oni klopodis kiel eble plej vaste reklami tiujn produktojn, ekz. per anoncoj en la esperanta gazetaro, en jar- kaj kongreslibroj kaj per aliaj tiam disponeblaj rimedoj (*nu, en tiuj tempoj evidente ankoraŭ ne ekzistis Interreto!*).

Ni montras al vi sur la venonta paĝo du superbajn "reklamaĵojn", kiuj funkciis por la posedantoj kiel okulfrapaj "elpendoŝildoj" ĉiufoje, kiam la brilaj horloĝoj estis elpoŝigataj en restoracioj, teatroj aŭ sur someraj terasoj de kafejoj en grandaj kaj provincaj urboj kaj aliloke.

La unua ekzemplero montras paradizecan gravuraĵon sur la kovrilo kaj pentritan, gravuritan zamenhofan buston sur la ciferplato, la alia estis en 1930 donacita kiel premio al fama esperanta verkisto. En la publika ĉirkaŭaĵo ambaŭ disvastigis klaran mesaĝon, laste sed ne balaste pri la posedanto mem, pri lia memkonscio kiel esperantano kaj pri lia bankokonto….





Diametro: ĉirkaŭ 54,5 mm / pezo: 115 g / metalo: arĝento








LA KOMISIONO DE
U E A
AL MERITPLENA
S-RO P. STOJAN L.K.
VERKINTO DE LA
BIBLIOGRAFIO DE INTERNACIA LINGVO
PASKO 1930 .

***Rekomendata verko: Marcus "Ziko" van Dijk-Sikosek: "Esperanto sen mitoj". Eld. en 1999 de FEL***

Bert

# *T E R M I N A R O*

## Alfabeta listo (40)

**damaĝita:** *difektita kaŭze de materiala difekto*

**elkursigi:** *preni el la monercirkulado = sennormigi monon*

**hokpesilo:** *simpla speco de unstero kun enkonstruita risorto kaj skalo. Avantaĝoj kompare kun originala unstero: rapida pesado kaj malbezono de diversaj peziloj*

**ingoto:** *metala stango fandita ingote*

**kataloga valoro:** *menciata prezo de katalogita objekto*

**kredito:** *1) konfido kiun ĝuas prunteprenanto aŭ ne tuj paganta aĉetanto pro sia pasinta akurateco en pago de ŝuldoj*
*2) sumo ĝis kiu iu povas pruntepreni (de banko) aŭ aĉeti, ne pagante tuj*
3) *parto de konto, kutime la dekstra, kie oni registras la pasivaĵojn de firmao k.s.*

**luti:** *kunfiksi metalajn pecojn, almetante inter ili fanditan metalon, sed ne fandante la koncernajn pecojn mem*

**mendilo:** *surskribota folio por mendi varon aŭ servon*

**mireto:** *bantoforma, klasika instrumento por forigi permane superfluan argilon de la baza formo, kiel skizendaj kaj farendaj monero aŭ medalo*

**oferto:** *propono de varo aŭ aktivado je specifa prezo*

**pasivo:** *la tuto de ĉiuj eroj, kiuj konsistigas la propran kaj fremdan havojn, ekzemple akcia kapitalo, rezervoj, kreditoj. Se bilanco estas duflanka, oni kutime registras ilin en la dekstra flanko.*

**peltro:** *alojo de stano kaj plombo kun kvazaŭ stana aspekto*

**pendopesilo:** > vidu “unstero”

**prilaborita:** *objekto ŝanĝita per uzo de instrumento, maŝino aŭ permane*

**stano:** *metalo arĝentoblanka, brila, facile oksidebla, tre facile fandebla, uzata aloje kun kupro aŭ zinko por estigi bronzon, kun plombo por luti kaj pure por tegi per maldika tavolo feron aŭ kupron*

**tegi:** *kovri ĉiuflanke per tegaĵo, ekz. pordojn per kupro*

**unstero:** *tipo de primitiva pesilo uzata ekde la unua jarcento sur vendoplacoj. Ĝi havis du malsame longajn “brakojn”. Je la malpli longa oni pendigis pesendan varon, je la alia pezilon kiu povis esti ŝovata en du direktoj*

# N U M I S M A T I K A   F O R U M O

## For la manaĉoj de niaj kontantaĵoj!

***En la vintra numero de "Esperanta Numismatiko" ni lasis Pieron Cipolionon en la nomo de ECB (Eŭropa Centra Banko) pledi surbaze de diversaj argumentoj por la baldaŭa (?) enkonduko de diĝita eŭro.***

***Atendante reagojn kaj eventualajn kontraŭargumentojn de nia legantaro, ni nun unue donos la parolon pri la sama temo al sinjoro Guy Legrand, iama ĉefredaktoro de la revuo "Cash!"***

### *Jen lia pledparolado:*

"Kolego, kiu en la printempo de 2004 vojaĝis hejmen, farinte reportadon en Talino (Estonio ĵus estis aliĝinta al la Eŭropa Unio) rakontis, kiel li tie komplete estis konfuzita, post kiam li lasis la aŭtomobilon apud parkumilo. Kiel kaj kie enmeti la monerojn? Li observis la aliajn aŭtomobilistojn kaj rimarkis, ke ili uzis iun aplikaĵon de sia plurfunkcia telefono. Sagaca teknologio, kiu tiutempe ĉe ni estis tute ne konata. En Usono kontantaĵoj jam delonge estas flankenmetitaj kaj anstataŭigitaj de kreditkartoj kaj multaj aliaj landoj, kiel Svedio sekvas la saman vojon. Dume, je la alia flanko de la spektro, la 500-eŭrobileto malaperis en la nebuloj de la historio, ĉar ECB ne plu eldonos ĝin…

Tio ŝajnas estis nur anekdoto, sed tamen ekonomoj kaj politikistoj emfazas, ke disponebla mono − barbara relikvo − ekkantis sian kanton de cigno. For la moneroj, for la biletoj, nur restu diĝitaj pagiloj!

Tute ne mankas argumentoj al tiuj advokatoj de la diablo, por forpeli kontantaĵojn: jen altaj kostoj kaj ŝtelistoj, aliflanke kaŝlaboro, drogoj, homvendado, terorismo ktp. Ne tute malprave, sed iom tro radikale: ankaŭ mafianoj uzas aŭtoŝoseojn kaj aviadilojn kaj neniu pripensas forigi tiujn trafikilojn, ĉu ne?

Antaŭ nelonge, la nuligo de kontanta mono estis proponita pro tio, ke ŝparemuloj malplenigus kontojn kaze de malaltiĝinta rentumo. Jen la uzo de devigiloj, por laĉi la privatan civitanan liberon, ĉar la kreskanta rezisto kontraŭ la devigado de diĝita mono certe rilatas al la persona libero. Tiel la "sistemo", eĉ kiam ni butikumas, klare scios kion, kie kaj kiom ni elspezis. Ĉu tio ankoraŭ estas laŭdemokracia? Kritikoj kontraŭ ĉie aperantaj gardaj kameraoj estas rebatataj per la banala respondo, ke "senkulpuloj ne bezonas timi ion ajn". Ĉu vere nenion? Eĉ nekorupteblaj civitanoj ne emas ekspozicii sian medicinan dosieron. Tamen, sendube multaj personoj delasas en la reto aliajn delikatajn datenojn ol nur informojn pri butikumado. Sed tion ili faras libervole, ofte senkonscie, eĉ ventkape. Jen alispeca sento ol la sperto "Big brother"-a kiu estas la ombro de ĉiu diĝita pagado. Tiel, ni timas, ke la ŝtato kapablos arbitre kartografi niajn patroflankajn posedaĵojn. Jen atakado kontraŭ simbolo de la individua libero!

La debato pri ebla nuligo de kontantaĵoj do ne nur estas afero teknika, sed ankaŭ politika kaj eĉ filozofia."

*Verkis: Guy Legrand*
*Elnederlandigis: Bert*
*Fonto: "Plus Magazine", n-ro 328 julio/aŭgusto 2016*

## E L  L A  G A Z E T A R O



**Numismatikajoj**

La kuba entrepreno pri monstampado eldonos du monerojn omaĝe al la 75-a UK en Havano. Unu el ili estas arĝenta (0,999) de la t.n. "semi-proof" kvalito, 16 gramojn peza, 38 mm de diametro. Valoro: 1 peso. Prezo 30 usonaj dolaroj (usd). La alia estas nikel-kupra, 30 mm de diametro, valoro 1 peso. Prezo 3 usd. Pagebla ankaŭ en valutoj DEM, GBP, CHF, CAD, NLG kaj JPY. Oni ne akceptas ĉekojn de aŭ al usonaj bankoj. Aldonu 2 usd (por Ameriko) aŭ 3 usd por aliaj mondopartoj por afranko. Pagoj per bankĝiroj iru al: Empresa Cubana de Acuñaciones, Banco Financiero Internacional, Havano, Kubo, konto: 402-01-909. Por mendoj de pli ol 50 ekzempleroj 20%-a rabato.

**Eraro** fine de la tria linio! > "*Valoro: 1 peso*" devas esti: **Valoro: 5 pesos**!




***La ENA-redakcio tutkore dankas Fernandon A. Paredes Elósegui, ĉefdelegito de UEA por Kubo pro la sendo de la anonco kaj multajn aliajn informojn, i.a. pri unu el la du medalistoj de tiu medalo.***

**R E T P O Ŝ T O**

de vi por ni!

# Reagoj kaj konversacioj

*18.10.2024   15:40*

*Kara Jozefo,*

*Jen aŭtuno! Ni ne plu devas ŝviti pro altaj temperaturoj, eventuale nur pro laboro!*

*Denove vi estos la unua (prov)leganto de la lasta numero de 2024. Eble la nura kiu legas ĝin komplete. (Espereble, pri tio, kion mi skribis, multaj legantoj protestos!)*

*Denove mi sincere kaj tutkore antaŭdankas vin pro via laboro volontula por nia asocio.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

21.10.2024   8:55

Kara Bert,

volonte mi subtenas vian benindan agadon. Ofte mi rememoras mian infanaĝon, kiam post la milito plimultiĝis moneroj kaj monbiletoj malvalidiĝintaj, kiujn ni pasie kolektis, interŝanĝadis aŭ gajnadis. Tiam konkeris min la beleco de la moneroj, medaloj, la mistiko de la latinaj aŭ alilingvaj surskriboj. La ĝuo de la estetiko de numismatikaĵoj restis al mi ĝis nun vera plezuro.



Antaŭ nelonge mi ricevis ĉi tiun memormedalon, dediĉitan al la hungara reĝo Matiaso la 1a.

Mi reciprokas viajn bondezirojn por la nova jaro kaj esperas ĉion bonan por via/nia revuo.

Kun amikaj salutoj: Jozefo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

07.10.2024   18:16

Saluton Bert,
Mi estas Petro Budai el Tienen (Belgio). Hazarde mi legis en la Reto unu el viaj artikoloj. Mi trovis vian retejon kaj samtempe vian artikolon en la Jarlibro 2018 de EGMP. Mi denove, pli atente relegos tiun artikolon kaj ankaŭ intencas legi la artikolon de L. Mee pri la stelo, publikigita en la Jarlibro 2000. La stelo-monerojn mi jam iam vidis.

En Loveno dum unu jaro mi lernis esperanton en kurso de Ivo Schenkel. Krome mi konas Paul Kempeneers, propagandanto de Esperanto kaj Henri Schutters el Peer, iama bibliotekisto de PHL, kiu ankaŭ informadas pri esperanto. Mi bedaŭras, ke via asocio “La Hirundo” ne plu ekzistas.

Samtempe mi estas estrarano de Numismatiko Lovena kaj membro en Diest kaj antaŭe ankaŭ en Tienen. Kiel estrarano, mi verkas, provlegas kaj publikigas numismatikajn artikolojn por la revuo de la lovena asocio.

Mi petas informojn pri via diĝita revuo “Esperanta Numismatiko”. Mi okupiĝas pri la mondo de lingvoj kaj kiel ili funkcias.

Salutas,

Petro

*08.10.2024   10:09*

*Saluton Petro,*

*estas agrable ekkoni ekssamurbanon, ankaŭ ĉar ŝajnas, ke ni havas komunajn konatulojn kaj ŝatokupon. Kiel iama membro de Esperanto 3000, kie mi uzis la lernolibron de Paul Kempeneers por instrui la bazan kurson, mi konis Ivo Schenkel kaj lia ĉarma edzino. Kun Marc Vanden Bempt kaj Roland Rotsaert mi fondis la esperantan arkivan asocion IEspA. La arkivejo nun troviĝas en Diest. Kiel naskita kaj edukita limburgano mi ankaŭ konas Henri Schutters, kiu estas unu el niaj membroj de ENA.*

*Kempeneers en 1986-1987 organizis versperan kurson en De Nobel en Tienen. El tiu kurso ekiĝis "La Hirundo", kies sekretario kaj prezidanto estis ekskursanoj de Kempeneers. Post 25 jaroj La Hirundo malaktivis pro manko de sekvantoj, la tragedio de multaj asocioj!*

*Kiel vi mi interesiĝas pri lingvoj. Mi planas baldaŭ eldoni la unuajn katalogon kaj terminaron pri esperanta numismatiko.*

*Por plenumi vian peton, mi aldonas la ENA-varbilon kaj la pli aktualan numeron de nia revuo.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

12.10.2024   22:56

Saluton Bert,

mi decidis aboni la revuon.

Se eble, mi povas traduki artikolon kaj publikigi ĝin en nia propra Leuven- revuo.

Petro

*14.10.2024   10:22*

*Saluton Petro,*

*En la venonta letero mi oficiale bonvenigos vin ĉe ENA, sed unue mi volas diri, ke vi rajtas traduki artikolojn senlime, se nur vi menciu la revuon, la jarkolekton, la numeron kaj la paĝon.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

14.10.2024   10:30

saluton Bert,

Dankon. Mi inkluzivas plenan bibliografion en ĉiuj miaj artikoloj.

Peter

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.10.2024   14:40

Kara Bert,

Kiel promesite mi aldonas la ligilojn al la retpaĝoj koncernantaj la dezajnistojn:

https://www.facebook.com/ruben.nutels/
https://baliyaelementryny.blogspot.com/2012/09/ruben-nutles-tamar-yoav.html
https://en.numista.com/catalogue/artist.php?id=1580
https://www.youtube.com/watch?v=2STUIvpIjJI
https://www.facebook.com/aharon.shevo/
https://www.temple-coins.com/blogs/news/meet-the-designer-of-the-abraham-accord-coin?srsltid=AfmBOorK7LJ7Bs-hWStCV_PVP_ZVojlCwDYR-OAtROPg5YzfzsOlw_Hu
https://www.youtube.com/watch?v=PxpcI2Vv6qs

Mi ĝojas, ke mi povis helpi vin, eĉ se ne multe.

Amike,

Jehoŝua Tilleman (Israelo)

*21.10.2024 13:12*

*Kara Jehoŝua,*

*Denove en pli bona sano mi tutkore dankas vin -tamen kun prokrasto- pro la tre interesaj kaj ege taŭgaj ligiloj kiu permesos al mi verki baldaŭ sufiĉe kompletajn artikolojn por la ENA-revuo!*

*Mi (r)estos miavice je viaj dispono kaj servo por helpi vin se vi iam bezonus min!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

23.10.2024 19:29

Kara Bert,

koran dankon pro mencio de la ligilo kie troveblas ĉiuj numeroj de via revuo.

Ankaŭ belajn festotagonj kaj ĉion bonan por 2025 deziras

Frank Merla
www.frali.net

PS: Mi povus instali por vi retan diskutforumon, kp. ekzemple simile kiel tiu: groups.io/g/frali

Mi povus difini ĝin tiel, ke nur aliĝintoj povas vidi ĝin kaj komenti en ĝi.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

23.10.2024 23:00

Koran dankon, kara Bert, pro via interesa revuo. Mi esperas, ke vi gardas ĉiujn elektronajn eldonaĵojn, por ke ili iam estu libroforme eldonotoj. Gravas por numismatoj, por niaj Esperanto-arkivoj kaj bibliotekoj.

Samideanajn kaj kuraĝigajn salutojn.

Via Jo Haazen

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.10.2024 12:39

Dankon pro la tre riĉa numero de via revuo. Bonvolu sendi ĝin al la listo scienca-kaj-faka-agado@groups.io, por montri la vivantecon de via faka grupo.

Amike,

Renato Corsetti

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.10.2024 14:35

Karega S-ro Bert Boon!

Dankon pro Via belega, enhavoriĉa ENA-Revuo!

Via revuo jam ekde multaj jaroj fidele riĉigas la diskutliston

medicinistoj-por-esperanto@googelgroups.com …

Apartan dankon pro la belegaj artikoloj pri nia amata patrujo, Hungario kaj pri Frigyes Karinthy kaj Béni Ferenczy!

Precipe ni ĝojas, ke nia kara amiko, Jozefo Horváth helpas Vian laboron.

Kun plej amikaj salutoj kaj bondeziroj,

Ludoviko Molnár kaj Julinjo Farkas

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.10.2024 19:13

Kara Bert Boon,

Mi sendas varman saluton al vi kaj al via tuta familio.

Mi elkore dankas vin pro la ENA-revuo J11N4, kiu estas tre valora.

Pro tio mi gratulas vin por la daŭra kaj inteligenta laboro.

Kun sinceraj salutoj!

Amike,

d-ro Mukunda Pathik

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.10.2024 2:14

Kara Bert

Mi ĵus aldonis la revuon al la kolekto en Vikiflandrio: [Esperanto arĥivo Esperanto Numismatika Asocio].

PS. Ĉu estas hazarde aŭ intence ke la teksto ĉifoje estas ekster la kadro?



Elkorajn salutojn

Albert Claesen

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

27.10.2024 9:49

Kara Bert,

mi dankas pro la sendado de la jarkolekto, kiun mi volonte kunportos al la kunveno de la aktivuloj de GEA, kiu okazos dum la venonta semajnfino en Göttingen apud Herzberg.

Kore,

Andreas Diemel

*01.11.2024 10:55*

*Kara Andreas,*

*Reveninte hodiaŭ el malsanulejo, mi dankas vin pro via interesa iniciativo!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

28.10.2024 8:11

Kara Bert,

elkoran dankon pro la nova numero de ENA-revuo!

Amike,

Velimir Piškorec

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.11.2024 18:20

Saluton kara Albert Boon,

Kiel vi fartas?

Hodiaŭ mi legis vian mesaĝon (estas la 24a de oktobro 2024),

Dankon al vi!

Saluton al via edzino Vivienne Tudts.

Amike via

Zhao Dezhi



05.11.2024 18:22

la foto estas mi kaj mia edzino Mei Mei.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

13.11.2024 19:58

Kara amiko Bert!

Dankon pro la letero. Fakte dum preskaŭ tri monatoj mi estis malsana. Kaj mi faris nenion.Kaj hieraŭ ni finis nian tradician multjaran aranĝon GRUPE-26. Estis preskaŭ 60 personoj el multaj polaj regionoj. Venis ankaŭ geedziĝaparo el Belgio. Ŝi Ella estas poldevena kaj edzo Edi estas fervora amanto de biciklado. Ella havas en Pollando gepatrojn.

La aranĝo estis tre interesa kaj amuza. Mia kuracisto permesis al mi (dank' al lia sperto) partopreni la aranĝon.

Nun estas tempo por plenumi miajn promesojn ligitajn kun nia printempa aranĝo okaze de 115a datreveno de Esperanto en Gliwice.

Post kelkaj tagoj mi preparos ĉion por sendo al Vi kaj al nia prezidantino Elda.

Kara Bert. Mi pensas, ke Vi ricevos ĉion bonorde. Mi sendos same diskalkulon al Vi kaj Vi poste pagos (nur post la alveno de paketo)

Fartu bone kaj ĝis la.....

Amike,

Via Stanislavo Mandrak

*10.12.2024 22:20*

*Kara Stanislavo,*

*Kiel vi fartas aktuale? Mi esperas pli bone ol mi!*

*Ne urĝas la sendaĵo, sed se vi povus jam sendi al mi la diversajn mezurojn de la kvar diversaj medaloj (vidu ĉe "Moneroj & medaloj" en nia revuo) mi jam povus ekpriskribi ilin por la nova revuo. Ĉu tio eblus?*

*Multan antaŭdankon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

01.12.2024 11:19

Bonan tagon, Bert.

Gratulon okaze de Tago de numismato.

Anatolo.

С уважением,

Anatolo



*01.12.2024 11:39*

*Saluton kara Anatolo!*

*Jen novaĵo por mi...mi ja ne sciis, ke la 1a de decembro estas la TAGO DE NUMISMATO, do speco de "sanktula tago".*

*Ĉu vi pri tio havas pliajn (historiajn) informojn? Eble tiu tago nur estas honorigata en via lando, ĉu? Tre interese!*

*Amike kaj NUMISMATE,*

*Bert*

01.12.2024 13:59

Bonan tagon, Bert.

Tago de sankta Eligio. Li estis protektanto de numismatoj, cizelistoj kaj juvelistoj ekde la 660 jaro. En Eŭropo oni festas la Tagon la 1-an de decembro.

Amike, Anatolo.

06.12.2024 17:30

Bonan vesperon, Bert.

Mi tute hazarde trovis informon pri esperantisto kaj medalisto Harcuba.

Amike, Anatolo.



*La 6-an de decembro 1928 naskiĝis Jiří Harcuba, ĉeĥa vitristo, skulptisto kaj esperantisto. Li kreis projektojn de centoj da medaloj kaj moneroj. Ekde 1976 li estis membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Por esperantistoj li proponis renovigon de Esperanto-monumento en Františkovy Lázně. Lia verkaro estis koncize prezentita en Esperanto-Muzeo en Svitavy kadre de la ekspozicio "Esperanto kaj muzoj", okazinta ekde junio 2013 ĝis majo 2014.*

*06.12.2024 19:21*

*Kara amiko Anatolo!*

*Jen iu el tiuj gravaj hazardoj kies rikolto estas fonto de kontenteco, almenaŭ por mi, numismato kaj esperantano.*

*Mi certe aldonos la du informojn al nova numero de nia revuo.*

*Multan, koran dankon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

10.12.2024 4:43

Estimataj,

**Mi invitas hodiaŭ al la Internacia Hibrida Kunveno en la urugvaja parlamento en Montevideo, kie antaŭ 70 jaroj aprobiĝis la unua Unesko-Rezolucio pri kaj por Esperanto. 10/12/1954 - 10/12/2024**

Informo en Esperanto en: Unesko kaj Esperanto: 70 jaroj da kunlaboro por lingvaj homaj rajtoj | Eventa Servo

Informo hispane en: Bienvenidos a la Sociedad Uruguaya de Esperanto

**Por la virtuala partopreno:**

**1- Spektu la eventon vive en la jutuba kanalo de UEA:** https://youtube.com/@UEAviva
**2- Partoprenu la eventon per Zoomligilo:**

**https://us02web.zoom.us/j/89585981089**

**Nur se demandite:**

**Kunven-identigilo: 895 8598 1089**

**Pasvorto: la nomo de nia komuna lingvo per minuskloj**

Korajn salutojn,

Dra. Sandra Burgues

Montevideo - Urugvajo

*10.12.2024 12:11*

*Estimata Samideanino,*

*vere grava evento por esti memorigata! Dankon pro la invito.*

*Kiel fondinto de la unua fakgrupo pri esperanta numismatiko, mi esperas, ke tiuokaze estas eldonata memormedalo, la plej efika montroŝildo de nia historio.*

*Amike kaj numismate,*

*Mag. Fil. Bert Boon*
*Iniciatinto de ESPERANTO- NUMISMATIKA ASOCIO (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito de UEA por Belgio*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*14.12.2024 18:19*

*Kara samideano Vlastomil!*

*Kiel vi fartas? Espereble vi ankoraŭ estas en bona sano kaj aktive daŭrigas la laboron por nia kara movado!*

*Mi bezonas vian helpon, ĉar mi apenaŭ komprenas vian gepatran lingvon. Laŭskribe la eksprezidanto sur la foto prelegis aŭ paroladis favore al esperanto. Ĉu vi povas traduki kaj konfirmi tiun informon? Ĉu vi aŭ alia samideano havas kromajn, pliajn informojn pri la konduto de Benes rilate la movadon dum lia funkciado kiel politikisto?*

*Mi intencas priskribi moneron kun la busto de Benes, do diverspecaj informoj pri li kaj esperanto estos bonvenaj!*

*Mi antaŭdankas vin tutkore!*





*Mag.Fil. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

17.12.2024 10:34

Kara amiko Bert!

Dankon por via letero. Mia sano ne tro bonstatas, ofte mi devas serĉi doktorojn. Sed mi baldaŭ havos 88 jarojn kaj en tiu aĝo sanproblemoj aperas.

Jen al via plua peto. Traduki la senditan tekston mi ne kapablas, kvankam mi iomete ĝin komprenas., Ĝi ne estas en la ĉeĥa, temas pri sudslava lingvo, ŝajne slovena, eble serbokroata. Sed originalon mi trovis en la libro pri historio de E. en nia lando. Sed la iama prezidento E. Beneš pli foje esprimiĝis pri Esperanto kaj estus bone tion mencii entute. Detalojn vi povas trovi en la libro: S. Kamarýt- Historio de la Esperanto movado en Ĉeĥoslovakio, pĝ 169-170, eldonis ĝin ĈEA en la j. 1983. Tie estas ankaŭ traduko do la sendita teksto.

Vlastimil Kočvara

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

16.12.2024 20:44

Estimata s-ro Boon,

en la lasta numero de "Israela E-isto" estis publikigita via foto kun granda bareliefo de L. Zamenhof, okaze de lia jubileo. Min ekinteresis tiu bareliefo: ĉu vi povas rakonti ion pri ĝi: la aŭtoro, jaro de apero, materialo ktp.

Kun granda estimo al via nobla agado pere de ENA,

Tatjana Auderskaja, ano de AdE

*17.12.2024   12:13*

*Estimata Sinjorino Auderskaja,*

*Mi bonorde legis viajn mesaĝon kaj peton. Evidente mi konsentas informi vin, se eble, sed mi ne vidis la kontribuaĵon en la "Israela E-isto", ĉar mi ne estas abonanto. Do mi petas vin skani kaj sendi al mi la artikolon.*

*Antaŭ nelonge mi petis informojn al israela kundelegito de UEA pri du medalistoj kiuj skizis belegan israelan zamenhof-medalon okaze de lia jubileo, sed mi ne sciis, ke oni intencis verki artikolon por tiu revuo. Eble la "bareliefo" estis tiu medalo, ĉu?*

*Vi estas la unua -sed espereble ne la lasta- membro de la Akademio kiu korespondas kun ENA kaj ŝajne vi jam havas informojn pri nia dume 11-jaraĝa asocio kun propra revuo (ĉu vi eble ŝatus senpage ricevi la lastan numeron de nia diĝita revuo?). Dankon pro via afabla komento pri nia agado!*

*Altestime kaj numismate,*

*Mag. Fil. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

17.12.2024   22:51

Estimata s-ro Boon,

dankon pro la tuja respondo! Kvankam mi ne estas kolektanto, mi volonte legos la afable de vi proponitan revuon.

Jen la du adresoj de tiu "Israela E-isto" № 178, kie mi trovis vian foton kun la interesa por mi bareliefo. https://mail.rambler.ru/r/view/INBOX/22683?cache_id=4018882591&part_id=2 kaj 178-GZ-4.pdf sur la paĝo 19 estas via foto kun du aĵoj en la manoj. Mi estos dankema, se vi informos ion pri la bareliefo: la aŭtoro, deveno, jaro de kreiĝo ktp.

Antaŭdankon, bondezire,

Tatjana Auderskaja, ano de AdE

*18.12.2024   23:58*

*Estimata samideanino,*

*Bedaŭrinde mi nu sukcesis malfermi ("eror") la bluan ligilon. Ĉar mi deziras informi vin, mi petis helpon al mia nepo, fakulo pri komputiloj. Ankaŭ li ne sukcesis kaj rekomendas al mi peti vin sendi al mi la koncernajn paĝojn aŭ la kompletan numeron de tiu revuo. Por helpi vin mi devas vidi la bareliefon…*

*Amike,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*18.12.2024   19:49*

*Saluton kara Petro!*

*Mi petas vian helpon por povi prisribi en la venonta ENA-revuo memormoneron honore al iama prezidento de via lando.*

*En la aldonata fragmento kun foto estas teksteto, probable en iu slava lingvo. Mi evidente ne sukcesis tradukigi ĝin, sed laŭdire esperantigita versio troviĝus en **S.Kamaryt:" Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio" sur paĝoj169-170…***

*Krome mi serĉas aliajn informojn pri la eksprezidento kaj la esperanto-movado.*

*Mi kore antaŭdankas vin pro via helpo!*

*Amike kaj numismate,*

*Mag.Fil. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*






18.12.2024 20:24

Kara Bert,

Jen tuj mia respondo, antaŭ ol via peto dronos en la listo de miaj farendaĵoj:

la teksto sub la foto ne estas ĉeĥa, verŝajne iu sudslava lingvo (kroata aŭ slovena). Temas při la salutvortoj de E. Beneš al la UK en Prago en 1921 kaj mi citas de Kamarýt:

**La ideo de unu kompreniga lingvo, kia estas Esperanto, estas grandvalora por ĉiuj sinceraj pacifistoj. Hodiaŭ ĝi ne plu estas utopio, sed problemo, při kiu laboras intelektuaro de la tuta mondo.**

Rilate al Beneš vi trovos certa sufiĉaj informoj ĉe
https://eo.wikipedia.org/wiki/Edvard_Bene%C5%A1

Kvankam oni skribas, ke mankas fontoj, certe la aŭtoro estas pli kompetenta ol mi.

Ankaŭ pri la ceteraj viaj eventualaj demandoj mi ne sentas min kompetenta. Se temas pri la historio de Ĉeĥio ĝenerale, mi rekomendas turniĝi al Jiří (Georgo) Celetka, rilate al la historio de la ĉeĥa Eo-movado al Miroslav Malovec, kiuj certe pli kompetentas ol mi, teknika edukito ĉiam profesie okupiĝanta pri tekniko.

Amike, kun kristnaskaj kaj jarŝanĝaj bondeziroj,

Petro Chrdle

P.S. Kontakton al ambaŭ vi trovos en kopilinio.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.12.2024 5:57

Karaj amikoj,

Guglo al mi tradukis la tekston asertante, ke temas pri la kroata. Krome mi sendas almete ankaŭ, kio troviĝas en Kamarýt.

Jen Kamarýt:

**"La ideo de unu interkompreniga lingvo, kia estas Esperanto, estas grandvalora por ĉiuj sinceraj pacifistoj. Hodiaŭ ĝi ne plu estas utopio, sed problemo, pri kiu laboras intelektularo de la tuta mondo.“**

Jen Guglo-traduko:

Ideja o jednom jeziki za sporazumijevanje, kakav je Esperanto, vrijedna je za sve iskrene pacifiste. Danas ona više nije utopija, nego problem, na kome radi inteligencija čitavog svijeta ... Uvjeravam vas, da ču svakom prilikom potpomagati ideju Esperanta ... (Dr. Beneš g. 1921)

**“La ideo de ununura lingvo por kompreno, kiel Esperanto, estas ofenda por ĉiuj sinceraj pacifistoj. Hodiaŭ ĝi ne plu estas utopio, sed problemo, kiun la intelektularo de la tuta mondo ŝatas solvi... Mi certigas al vi, ke mi subtenos la ideon de Esperanto ĉe ĉiu okazo...”** (D-ro Beneš naskiĝinta en 1921).

Iom ŝerca estas, ke anstataŭ "grandvalora" Guglo skribas "ofenda", sed la cetero estas preskaŭ la samo.

Amike

Miroslav Malovec

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

06.01.2025 15:16

Karaj samideanoj!

stelaro.esperanto@gmail.co ne funkcias

Mi verkas tekston pri la plastaj kaj ne-plastaj steloj.

Kiel statas la afero?

Ĉu io nova kaj aktuala?

Kun amikaj salutoj

Walter KLAG
Ĵurnalisto kaj eldonisto - La Bulteneto
Fakdelegito de UEA por numismatiko

06.01.2025 16:01

Saluton,

Ne estas iu novaĵo pri la steloj en la lastaj kelkaj jaroj. Ili laste estis uzitaj en KKPS 2019, mi kredas.

Ro*jo

06.01.2025 16:29

Kara Ro*jo!

Dankon pro via respondo.

Kial ne revivigi la stelojn?

Aktuale mi vendas ilin, ĉiam skribas interesuloj al mi.

Jen en aŭkciejo: Esperanto-steloj aĉeteblaj

Vendisto: Aukciejo Dorotheum en Vieno.

https://www.dorotheum.com/de/a/110404 Lot 91 = Esperanto-Steloj

1 + 5 + 10 + 50 (arĝenta) + 100 (arĝenta) Steloj Prezo 135 €

Bildoj:http://www.muenzkatalog-online.de/katalog/kategorien/kat_gal_1840.html

Walter

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

| |
|---|
| ***A N O N C O J*** |
| ***&*** |
| ***E V E N T O J*** |

## Prototipoj de medaloj por esperantistoj




*“Prototipoj de medaloj por esperantistoj:*

*estas planite premii aktivulojn (veteranojn) kiuj kontribuis al la evoluo de la esperantista movado (“ora” medalo).*

*Estas ankaŭ planite premii la gajnintojn de edukaj olimpikaj konkursoj rilate al la esperanta lingvo. Kaj la organizantoj de ĉiujaraj esperantistaj kongresoj okazantaj ĉiun trian jaron ankaŭ devus esti premiitaj. (“arĝenta” medalo)*

*Sur la dorsa flanko de la medalo (mi forgesis desegni ĝin) sur ambaŭ medaloj estu surskribo:* ***"Por la aktiva evoluigo de la esperantista movado"*** *kaj la dato de la premio.*

*PS: se ĉi tiu ideo ne realiĝus, tiam ĉi tiuj medaloj povus esti uzataj kiel suveniroj.”*

Laŭ anonco de: 

en Googl

**Pri poto, plena je 68 samspecaj ormoneroj, antaŭ 2400 jaroj enfositaj kaj "forgesitaj", antaŭ nelonge retrovitaj en la okcidento de Turkio**



Arkeologiista teamo de la Universitato de Miĉigano (Usono) malkovris en 2023 en Nociono – antikva, greka urboŝtato ĉe la okcidenta marbordo de Anatolio (Turkio) kaj 50 km sude de Izmiro – trezoron en poto plena je oraj, preskaŭ samaspektaj persaj moneroj, tre probable iam celitaj por pagi la salajrojn de dungsoldatoj.

Tiuj moneroj montras bildon de genufleksanta arkpafisto, tipa dezajno de la persa monero "dariko", speco de ora monero, pregita en la Persa Imperio, eble en Sardeso, nur sesdek mejlojn nordoriente de Notiono.

La trezoro estis trovita en angulo de ĉambro, sub iama greka konstruaĵo. Ĝi estis verŝajne "forgesita" de rifuĝinta aŭ poste mortinta soldat(estr)o.

Laŭ la famega grek-antikva historiografo Ksenofono unu dariko sufiĉis por pagi la salajron de unu dungsoldato dum unu monato.

***Alvoko:***

***bonvolu sendi al ni***

***artikolojn arkeologitemajn pri numismatikaj trovitaĵoj!***

# Varbilo por ENA!

**Karaj membroj kaj aliaj numismatoj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o, kara leganto,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis **170** individuaj membroj kaj **25** esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ **ne kasiston!** Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: **"Mi konsentas aliĝi").** Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post via aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) viziti kaj elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE, sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

## Vi krome ankaù rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
bert.boon@skynet.be